


LA JUNA VIVO

DUŜEMAJNA
ORGANO



POR LA
JUNULARO

Redakcio kaj Administrado:
West-Graafdiijk (N.H.)
Nederlando.

Gironumero 209354 Nederlando.

Nederlando: jarabono f 0,75

Unuobla ekz. f 0.03

duobla ekz. f 0.06

Aliaj landoj: jarabono f 1.00.
(15 Belg. fr. 10 Fr. fr.)

IU FAKTO, IE, DUM LA MONDMILITO.

Decembro 1914. Vintra tago. Ie sur la vasta batalkampo POL deĵoras malgaje en la profundaj tranĉeoj. Noktiĝis. Eĉ la brilantaj steloj, naŭzante pro tia surtera abomenaĵo, vualigās malantaŭ la grizaj nuboj. Neĝo falas kaj sternas sian blankan morttukon sur la kadavrojn. Silento regas; nur de tempo al tempo kugloj siblas, kaj la raketoj lumigas la danĝeran terspacon inter la pikildratoj. Trans ĉi tiuj bariloj je dudek kvin metroj, same en tranĉeoj, staras la malamikoj.

La frosto glaciigas la tutan korpon de la kompatinda soldato, kiu sole revas pri la feliĉaj tagoj, kiujn li travivis ĝis antaŭ kelkaj monatoj. Kial li batalas ĉiutage kontraŭ viroj, kiuj neniam malutilis al li mem? Eĉ ilian lingvon POL parolas flue krom sia propra dialekto.

Ĉio estas miskompreno al POL. Li loĝas ĉe la landlimo, kaj lia bona najbaro FRANZ deĵoras nun en la malamika armeo. Eble morgaŭ FRANZ staros kun pafilo kontraŭ li kaj diros: „POL vi estas mia kara amiko! Ĉu vi deziras trabori mian bruston per via bajoneto? Ĉu vi ne memoras, kiel mia patrino saltigis vin sur siaj genuoj? kiel ni, plenaĝuloj, trinkis post akra laboro el la sama botelo?”

Senhezite POL respondas en si mem: „Ne! mi ne mortigos mian amikon!”

Inter du eksplodoj ĉiam revante, li revidas sian tutan familion, sian patron, kiu ĉiutage renkontas survoje la patrinon de FRANZ, dirante: „Eble hodiaŭ, mia filo mortigos vian.” Tiel kontraŭvole amikoj fariĝas malamikoj.

Ĉie malamo Kial? Kial?

Subite severa voĉo vekas POL. Suboficiro duondormante ordonas al li alporti freŝan kafon al kamaradoj, kiuj deĵoras antaŭ la pikildratoj. La kuiristo tuj enmanigas tolan sitelon da kafo al POL, kiu denove revante foriras por plenumi sian taskon.

La tranĉeoj estas multaj kaj intermiksiĝas labirinte; kelkaj el ili eĉ kondukas en la malamikajn tranĉeojn. Ofte kaŭrante li devas eviti la kuglojn, atendi ĝis la pafado ĉesos, ĉar ĉie la MORTO ĉirkaŭvagadas.

Lacigite POL eraras pri la vojo, kaj li iras kun la sitelo da kafo en la mano rekte al la malamikoj. Akra voĉo haltigas lin: „Kiu estas vi?”

Senkonscie, tute nature POL respondas per la sama lingvo:
„Amiko!”

Tuj falas la bajoneto, preskaŭ pikante jam lian ventron.

„Ĉu vi estas vere amiko?” demandas la deĵoranta soldato.

„Mi ne konas vin persone” — respondas POL — „sed unu el viaj kamaradoj estas mia plej kara amiko. Nur la landlimo apartigas niajn bienojn, tamen niaj koroj estas frataj.” Tia interparolado moligas la soldatojn, kiuj alproksimiĝis, kaj iom post iom frateco radiigas la okulojn. „Jen la kafo” — diras POL — „ni trinku ĝin kune.”

Ĉiuj trinkas je komuna sano ne pensante, ke eble morgaŭ ĉiuj estos mortintaj.

Post kora manpremo POL malgaje reiras al la kuiristo, postulante de li novan kafon por la aliaj kamaradoj, kiuj estas ankaŭ liaj fratoj.

Kiam tagiĝas, POL estas tre laca sed kontenta, plenuminte siajn du taskojn. Tamen la unua, la plej bela restos tute nekonata, ĉar pro troa interfratiĝo dek du k u g l o j traborus lian bruston, kie batas homama koro.

Dijon, Francujo.

originale verkis M. MATTHIEU.

KOMUNIKOJ PRI LA GAZETO:

1. Aperis artikoloj aŭ notoj pri „La Juna Vivo” en „Baarnsche Courant”, „Proletarische Vrouw”, „The British Esperantist N. 354”, Flandra Esperantisto”: Aŭgusta kaj Septembra numeroj, „Hispana Esperanto” No. 41. Bulteno de I.S.A.E.” No. 36.
2. La 9a numero aperos 1 Nov.
3. Oni povas aboni nur ekde 1 Julio. ;

„ESTAS VILHELMO!”

Iun uraganan aŭtunan nokton vekigis la homoj en vilaĝo, kiu situis apud la maro, pro kanonpafo. Ĉiuj sciis, kion signifas tio, kaj la viroj kuris rapide al la marbordo. Tie ili vidis ŝipon, kiu surveturis la rifojn. La ŝipanaro surgrimpis la maston, por ke la ondoj ne forprenu ilin. „Pretigu la savboaton!” kriis unu el la kuraĝaj marbordanoj. La savboaton oni rapide enakvigis, kaj kelkaj el la plej kuraĝaj saltis en ĝin. La brava boatdirektilisto ne ĉeestis, tamen oni ne povis atendi lin, ĉar ĉiun momenton la ondoj minacis detruai la ŝipon. Estis ok viroj, kiuj elremis en la furiozan uraganon. Ili feliĉe venis al la ŝipo kaj helpis la ŝippereulojn en la boaton — krom unu, kiu sidis alte en la masto, preskaŭ rigidfrostita. Lin oni ne kuraĝis helpi, ĉar la boato ne povis porti pli da personoj, kaj la uragano plifortigis. Ili komencis remi al la bordo kaj venis sekure al ĝi. Nun la boatdirektilisto revenis. Hardi — tio estis lia nomo — demandis, ĉu oni savis ĉiujn. Kiam li aŭdis, ke ankoraŭ unu estas sur la ŝipo, li kriis: „Mi venigos lin. Ĉu vi kuniros?” Neniu volis sekvi lin. „Estas neeble savi lin”, diris ĉiuj. „Tiam mi iros sola”, diris Hardi kaj saltis en la boaton. En la sama momento venis lia patrino kaj petis lin resti hejme. „Pensu pri via patrino”, ŝi diris. Kaj memoru, ke via patro dronis en la maro kaj eble ankaŭ Vilhelmo”. (Vilhelmo estis ŝia plej juna filo. Li estis maristo, kaj dum ok jaroj neniu aŭdis ion pri li.) „Kaj li tie”, diris Hardi”, „ĉu vi estas certa, ke li ne havaŝ patrinon?” La maljunulino silentis, kaj kvar viroj saltis en la boaton. Ili remis ĝis la ŝipo, malgraŭ tio, ke estis tre malfacile remi tra la grandaj ondoj. La ŝipkorpo estis jam sub akvo, kiam la boato alvenis. Hardi devis mem surgrimpiti la maston kaj li devis tre peni por helpi la rigidfrostiton en la boaton. Sed fine li sukcesis, kaj urĝe oni rerenis al la marbordo. Kiam la boato venis proksime al la bordo, Hardi kriis per forta voĉo: „Diru al mia patrino, ke estas Vilhelmo!”

El la sveda lingvo tradukis: B. KARLSSON.

RICEVITA LIBRO.

Charles Dickens: La Vivo de Nia Sinjoro Jesuo.
Eldono de: The Esperanto Publishing Co., 142 High Holborn, London
W.C. I. Dickens verkis ĉi tiun libron por siaj infanoj. S-ro Butler sukcesis traduki la libron tiel simpla, ke ĝi estas legebla por ĉiuj komencantoj. La bildoj estas belaj, la papero bonkvalita. La prezo: 6 ŝilingoj, afranko 6 pencoj.

„LULKANTO”

NUN DORMU, E. TU. LI. NO, NUR DORMU, MI - A FLOR' VIN
LULAS LA PA. TRI. NO KUN A. MO PLE. NA KOR: HA,
HOJ. DA, HOJ. DA, HOJ!

En sonĝo aperados
Al vi la anĝelar',
Kantante ekdancados
Belega dancopar'.
Ha, hojda, hojda, hoj!

Okulojn bluajn fermu,
Plej kara etulin'
Kaj dormu, ho, ĝis veku
La kara suno vin.
Ha, hojda, hojda, hoj!

J. V. DOLINSKY. Ĉeĥoslovakujo.

LUDO.

Sep estas tro multe.

Gvidanto: Kiom estas unuoble sep, duoble sep, kvaroble sep, k.t.p.

Skribu la respondojn sur vian paperon: 7, 14, 21, 28, 35, 42, 49, 56, 63, 70, 77, 84, 91, 98.

Skribu nun la nombrojn kun la cifero sep!
7, 17, 27, 37, 47, 57, 67, 70, 77, 87, 97, 71, 72, 73, 74, 75, 76, 77, 78, 79.

Nun ni nombru! Sed anstataŭ la nombroj, kiujn ni surskribis, ni diras: „abu”. For la paperojn! Petro komencu! Kaj laŭvice la aliaj. 1, 2, 3, 4, 5, 6, abu, 8, 9, 10, 11, 12, 13, abu, 15, 16, abu, 18, 19, 20, abu, k.t.p. ĝis 100. Kiu forgesas la „abu”, tiu eliru!

KORESPOND-ADRESO: ĈIU VORTO: 0,03 GLD.

ANGLUJO: 40 knaboj (8-13 jaraj) formis „Internacian Klubon” kaj deziras korespondi kun geinfanoj el ĉiuj landoj. Skribu al „Internacional Club”, Gayhurst School, Gerrards Cross, Bucks. Respondos certe.

SENKULPA ŜTELISTO.

Fripono ŝtelis belan ĉevalon. Li jam sidis sur la besto por forrajdi, kiam policano arestis lin.

Iom poste ili alvenis en la policejon. La poliestro demandis al la ŝtelisto: „Kiel vi ekhavis la ĉevalon?”

La viro respondis: „Sinjoro la poliestro, mi vere ne ŝtelis ĝin! La besto volis forkuri kun mi! Jen la klarigo: Mi iris en mallarĝa strato. En tiu strateto staris ĉevalo, kiu baris al mi la vojon. Mi volis preteriri antaŭ la ĉevalo, sed la bestaĉo volis mordi min! Nun mi klopodis preteriri malantaŭ la ĉevalo, sed ĝi tiam piedbatis malantaŭen al mi. Kiel nun agi? Mi decidis iri trans la beston sed apenaŭ mi sidis sur ĝia dorso, kiam ĝi intencis forkuregi kun mi! Vi do komprenas, ke mi estas tute senkulpa!”

La poliestro nur diris: „Kara amiko, ni tenos vin ĉi tie, por ke vi ne tuj ree renkontu ĉevalon, kiu intencus forkuri kun vi!”

Leeuwarden, Nederlando.


Adapte trad. B. R.

Solvaj el No. 7.

- 1 2 3 Kun.
2 4 5 Unu.
3 5 6 Nur.



1. Avo.
2. Vo.
3. O.



Sorĉa kvadrato.

1	2	3	4
2	5	6	7
3	6	8	9
4	7	9	10

Sorĉa triangulo.

	1	2	3	4
1				
2				
3				
4				

a, a, e, e, e, e, e, k, n, r, r, r, r, t,
v, v,

a, a, d, d, i, n, n, o, o, o,


La signifoj de l' vortoj:

- 1 2 3 4 Cifero
2 5 6 7 Adverbo
3 6 8 9 Adverbo
4 7 9 10 Adverbo

La vortoj signifas, horizontale kaj vertikale:

1. Akvoŝvelon
2. Pronomon
3. Prepozicion
4. Literon

B. R. Riga.



LA SESA LECIONO.

- | | | |
|---------------|-----------|---------------|
| 1. patrino | 9. pipro | 17. najlo |
| 2. filo | 10. supo | 18. ŝnuro |
| 3. portreto | 11. oleo | 19. orelo |
| 5. telero | 12. saŭco | 20. vango |
| 4. tablo-tuko | 13. salo | 21. okulo |
| 6. tranĉilo | 14. korko | 22. mentono |
| 7. kulero | 15. rando | 23. nazo |
| 8. forko | 16. piedo | 24. ter-pomoj |

1. pipro estas en piprujo

3. saŭco estas en saŭcujo

2. salo estas en salujo

4. supo estas en supujo

En kio estas sukero, lakto, oleo kaj inko?

EN LA ĈAMBRO.

A

1. Estas kvar **personoj** en la familio: patro, patrino, filo kaj filino.
 2. La patrino staras kaj la filo **sidas** ĉe la tablo.
 3. La patro **laboras** en **fabriko**.
 4. Li estas laboristo.
 5. La filino ankaŭ laboras **ekster** la domo.
 6. **Ŝi** estas laboristino.
 7. Antaŭ Karlo staras sur la tablo supo, terpomoj, kaj saŭco.
 8. La **apetito** de Karlo estas granda.
 9. Li estas tre **malsata**.
 10. Li **promesas** al la patrino **studi** en la **esperanta leciono** post la manĝo.
 11. La patro kaj la patrino estas esperantistoj.
 12. La portreto de Zamenhof pendas sur la muro.
 13. La patrino **ofte rakontas** al la filo **pri** Zamenhof..
 14. La **historio** de Zamenhof estas **tre** interesa.
 15. Li laboris dum la tuta **vivo** por internacia **lingvo**.
 16. Karlo studas nun dum unu **jaro super** Esperanto.
 17. Kaj legas jam en „La Juna Vivo”.
 18. La patrino diras al Karlo: „Mi estas **ĝoja** ĉar mi estas Esperantistino.
 19. Ĉiuj homoj, **kiuj laboras** por granda **celo** estas **feliĉaj** kaj **ĝojaj**.”
 20. Karlo **respondas**: „Mi **volas baldaŭ korespondi** kun eksterlandaj amikoj.
 21. Mi volas baldaŭ legi pri la vivo de la homoj en Franclando, Svedlando, Nederlando, Germanlando, Ruslando k.t.p.”
- a. Kopiu la frazojn en vian kajeron.
b. Traduku la frazojn en vian gepatran lingvon.

B.

1. La knabo **volas studi**. La knaboj **volas studi**.
2. La filino **promesas labori**. La filinoj **promesas labori**.
3. La patrino estas en la ĉam- **Ĉu** la patrino estas en la ĉambro?
bro.
4. La filo **sidas** sur la seĝo. **Ĉu** la filo **sidas** sur la seĝo?
5. La pipro estas en la pipru- **Ĉu** la pipro estas en la piprujo?
jo.
6. **Ĉu** la supujo estas sur la **Jes**, la supujo estas sur la tablo.
tablo?

7. Ĉu la portreto pendas sur la muro? Jes, la portreto pendas sur la muro.
 8. Ĉu la supo estas en la laktujo? Ne, la supo **ne** estas en la laktujo.
 9. Ĉu la patro estas en la ĉambro? Ne, la patro **ne** estas en la ĉambro.
 10. Ĉu la hundo estas sur la tablo? Ne, la hundo ne estas sur la tablo.

- a. Traduku la frazojn en vian gepatran lingvon.
 b. Post kelkaj tagoj traduku la frazojn en esperanton.

1. Kie estas la patrino? 8. Ĉu li estas tre malsata?
 2. Kie estas la patro? 9. Kio estas la patro kaj la patrino?
 3. Kie estas la filo? 10. Kio pendas sur la muro?
 4. Kie estas la filino? 11. En kio legas Karlo?
 5. Kio estas sur la tablo? 12. Ĉu la historio de Zamenhof estas interesa?
 6. Kio estas la patro?
 7. Kio estas la filino?

REKLAMTARIFO:

I paĝo: 20 gld.; ½ paĝo: 11 gld.; ¼ paĝo: 6 gld.; ⅛ paĝo: 3,5 gld.;
 1/16 paĝo: 2 gld.

BULGARUJO

la lando de la rozoj, la Balkana Svisujo, ekkonu ĝin per la esp. verkoj:

La Bulgara lando kaj popolo,
 kun etnografia trikolora landkarto, 150 pĝ., rabatita prezo 1,50 fl.

Bulgara Antologio,
 bukedo de 40 geverkistoj, prozo kaj poezio, kun fotoj, 250 pĝ.
 rabatita prezo 1,50 fl.
 Haveblaj ĉe l'aŭtoro:

**Ivan Krestanov, str. 6 Septemvri, 2
 Sofia, Bulgarujo.**

Atentu !

La junaj esperantistoj, kiuj interesiĝas pri la Sciencoj, devas fariĝi membroj de la Internacia Scienca Asocio Esperantista, ĉar Scienco estas tre bona kampo por nia internacia lingvo, kiel diris Dro Zamenhof mem.

Kotizo 15 fr. fr., jare rajtinganta por la trimonata bulteno, tre bele presita kaj tre interesa.

**Kasisto: S.ro DUPUIS, 56e RUE
 DE LAROCHEFOUCAULD,**

PARIS 9°.

Ĝironumero: — 199-07 Paris.